

LÉON COURTINAT

×



# HISTORIO DE ESPERANTO

*(Movado kaj Literaturo)*

(1887-1960)



AMENHOF

ВГБИЛ заказ № 6920 87г.

кол-во экз. \_\_\_\_\_

вынос разрешен

#### SENSUKCESA PROVO DE REFORMOJ

Post la Ĝeneva kongreso por konfirmi sian promeson pri monhelpe Javal en la okazo se li baldaŭ mortus pere de Majoro Lemaire sendis al Zamenhof 250.000 orajn frankoj por ke li faru la necesajn reformojn en la lingvo. Zamenhof veturis la 15 de Oktobro al Bruselo kaj tie diskutis la aferon, kun Lemaire. Javal malsana ne povis veturi. Tial Z. veturis al Parizo kie li restadis inkognite de la 17. ĝis la 23 Oktobro kaj diskutis kun Javal kaj du lingvistoj Miguel de Toro kaj Blondel.

Z. ne povis interkonsenti kun Javal pri la farotaj reformoj — el du kaŭzoj : unue ili ne rigardis la problemon el la sama vidpunkto Z. konsideris antaŭ ĉio E. kiel ekzistantan lingvon kaj esploris de interne, kiaj simpligoj povus esti oportunaj por la uzantoj. Javal konsideris E. kiel projekton de lingvo kaj esploris de ekstere kiaj ŝanĝoj povus igi ĝin pli simpatia al romidaj lingvistoj aŭ kleruloj. Due Z. volis antaŭ ĉio gardi la kontinuo de la lingvo, dum Javal opiniis, ke rompo de kontinuo neniel gravas ĉe tiel juna lingvo kaj por tia celo, kiel atingo de oficialiĝo. Javal jam havis pri tiuj du punktoj la pensmanieron de la Delegacio. La pozicio de Z. estis evidente la plej saĝa kaj tial oni povas demandi sin, kial li ne simple kaj absolute rifuzis paroli pri ŝanĝoj ; sed li estis ĉiam tro impresema al la amikaj insistoj kaj tro naive kredema al la eblo kontentigi kiel oni diras france « ĉiujn pasantojn kaj ankaŭ sian patron ».

Komprenante ke li ne altiros Z. al tiaj reformoj, kiajn li deziris Javal proponas iniciate provi mem novan ortografion sen super-signoj Z. promesis ke li ne protestos, se Javal publikigos tian provon. Couturat sia flanke ellaboris unu sistemon de reformoj kiu estas antaŭprovo de la estonta Ido. Li komunikis tiun projekton al Z. kiu respondas al li la 9 Novembro ke li submetu ĝin al la Delegacio.

Ankaŭ Michaux zorgis pri plibonigoj — en la direkto de tiu, kiu fariĝis poste lia projekto « Romanal ».

Fine Z. por kontentigi la reformemuloj sendis la sekvantan leteron de 22/11/1906 al Boirac Prezidanto de la Lingva Komitato : Pri neologismoj .

Cirkula letero al la membroj de la E. Lingva Komitato.

#### Ia PARTO

Ĉu E. devas esti reformata aŭ ne ? Tiu ĉi eksterordinara grava demando jam okupas la kapojn de multaj esperantistoj. Malgraŭ la ŝajna trankvileco kiu ekregis en la mondo Esperantista post la komuna voĉdonado de 1894, malgraŭ la konstanta publika ripetado de ĉiuj plej gravaj esperantistoj pri la netuŝebleco de E., malgraŭ la Deklaracio de Buljono, malgraŭ la interkonsento de ĉiuj redaktoroj de nia gazetaro — la demando pri reformoj ne ĉesas okupi la kapojn de tre multaj Esperantistoj. Ekzistas multaj personoj, kiuj estas ĝenerale estas kontraŭ ŝanĝado, tamen pri

tiu aŭ alia punkto aparta, kiu ne plaĉas al ili, ili pensas, ke por tiu ĉi punkto oni devas fari escepton kaj tiu ĉi punkto nepre devas esti ŝanĝata. Malgraŭ la ŝajna trankvileco publika, mi tamen private ricevas ĉiutage diversajn leterojn pri ŝanĝoj, kaj kelkaj el la proponantoj estas eĉ tiel senpaciencaj, ke ili forgesante la tutan danĝerecon de ilia paŝo, volis jam mem enkonduki reformojn kaj batali por ili.

Ĉu E. devas esti reformata? Unuj respondas tiun ĉi demandon per absoluta «jes» forgesante, ke tio ĉi enkondukus mirindan haŭson en nian aferon kaj ke, por bone progresi, nia afero bezonas antaŭ ĉio severan konstantecon kaj unuecon; aliaj respondas per absoluta «ne» forgesante, ke por ĉiama rigidiĝo estus neprudenta.

Ambaŭ diritaj partioj estas pravaj kaj ambaŭ ankaŭ estas nepravaj; ĉar ia absoluta respondo por la supre dirita demando en nia afero ne povas kaj ne devas ekzisti. Ni devas trovi vojon mezan, kiu de unu flanko gardus nin kontraŭ ĉiuj danĝeroj de «rompado»; kaj de la dua flanko donus al ni la eblon forigi el nia lingvo tiujn kelkajn maloportunajn punktojn, kiuj en la tempo de la kreado de la lingvo ne estis rimarkitaj, malgraŭ la plej zorga kaj plej longa elprovado, kaj kiujn elmontris nur poste la vasta multjara kaj multe persona praktika uzado.

Ĉu ekzistas tia meza vojo, kiu de unu flanko gardus nin kontraŭ ĉia rompado de la unueco de nia lingvo kaj de la dua flanko donus al ni la eblon perfektigi ĝin? Jes tia vojo ekzistas. Per kelkaj vortoj mi jam parolis pri ĝi en la antaŭparolo al la «Fundamento de E.» nun mi volas klarigi mian ideon pli detale. Mi intencis ĉion ĉi fari en la Buljona kongreso sed bedaŭrinde mi devis tion ĉi prokrasti.

## IIa PARTO

Antaŭ ĉio ni devas unu fojon por ĉiam fiksi konstantan kaj por ĉiam severe netuŝeblan fundamenton por nia lingvo (la legantoj scias ke tiun fundamenton la esperantistoj jam fiksas per la Deklaracio akceptita en la Buljona kongreso). Dank' al decido ke la esperantistoj ne faros eĉ la plej malgrandan ŝanĝon en la Fundamento de E., ni povas nun esti tute certaj ke nia lingvo neniam disfalos kaj ĉio ĝis nun farita kaj akirita neniam perdos sian valoron.

Sed farante nenian ŝanĝon kaj neniam eljeton el la ĝisnuna lingvo ni havas tamen la rajton aldoni al ĝi diversajn novajn vortojn aŭ formojn ne sole por la ideoj, kiuj mankis en niaj vortaroj, sed ankaŭ por tiaj ideoj, kiuj jam ekzistis en la vortaroj. Jen tiuj ĉi novaj vortoj kaj formoj savos la tutan situacion kaj donos al ni la eblon interkonsentiĝi perfektigon de nia lingvo kun ĝia plej severa netuŝebleco.

Se ni bone kaj mature esploros nian tutan lingvon kaj ĉiujn reformajn proponojn, faritaj en la daŭro de la pasintaj 19 jaroj, ni facile rimarkos ke ĉiujn ĝis nun faritajn reformajn proponojn oni povas dividi el la sekvantaj 5 kategorioj.

a) La unua (plej granda) kategorio prezentas reformojn, kiuj estas nur personaj kapricoj de tute ne spertaj personoj kaj nur al siaj aŭtoroj ili ŝajnas plibonigoj, sed al la plimulto de ĉiuj aliaj E. ili aperas nur kiel malplibonigoj de la lingvo. Tiun ĉi kategorion da reformoj ni sekve simple devas absolute forjeti.

b) La dua kategorio prezentas reformojn, kiuj per si mem eble estus bonaj sed kiuj tuŝas ne speciale la lingvon E. sed diversajn demandojn ĝeneralajn per kiuj oni eble jam poste povos komenci propagandon tute apartan, sed kiujn miksi kun la afero E. ni absolute ne devas. Enkonduko de lingvo internacia estas jam per si mem afero tre granda, grava kaj malfacila kaj se ni volos ĝin ankoraŭ pli malfaciligi per almikso de diversaj aliaj demandoj, tion ni neniam atingos. Al tiu ĉi kategorio apartenas ekzemple skribado stenografia anstataŭ litera, ŝanĝo de la formo de l' literoj, aŭ almenaŭ forigo de la streketoj kaj punktoj, kiuj maloportunigas la skribadon (ekzemple en «t», «i», ktp.) forigo de grandaj vortokomencaj literoj, filozofia precizigo de la senco de ĉiuj vortoj ktp. Al tiu ĉi kategorio apartenas ankaŭ la postulo doni anstataŭ la literoj supersignitaj iajn literojn novajn, aliformajn kiuj liberigus de la maloportuna uzado de signetoj kaj de superflua skribado de «h» Neniu sekve krom la aŭtoroj dubos ke tiun ĉi kategorion da reformoj mi en la nuna tempo devas kompreneble lasi tute sen atento.

c) La tria kategorio prezentas reformojn, kiuj estis destinitaj nur por fari bonan kaj allogan impreson sur la varbotaj neesperantistoj, sed prezentas nenian oportunaĵon por la jam varbitaj uzantoj de E. Tiuj ĉi reformoj sekve povas havi ian valoron nur en la periodo de propagando, sed havas absolute nenian signifon en la periode de praktika uzado.

Ekzemple al varbotaj neesperantistoj eble povos pli plaĉi se la vortaro estus tute homogena kaj konsistus ekzemple nur el radikoj romanaj, aŭ se el ilia nacia lingvo estus prenite pli da radikoj ol el la aliaj lingvoj «naturaj», ktp. Sed por la personoj kiuj jam ellernis kaj uzas la lingvon, estas ja tute egale ĉu ili devas diri «blinda aŭ ceka», «hundo aŭ kano», «tuj aŭ imediate», ktp. Al tiu ĉi kategorio da reformoj, taŭgantaj nur por la unua periodo, sed havantaj nenian valoron por la dua periodo de E. apartenas interalie la postuloj terure malriĉigi la sonaron de la lingvo, elŝetante el ĝi kelkajn tre gravajn sonojn nur tial, ke en kelkaj lingvoj ili ne ekzistas (kvankam la membroj de tiuj nacioj tre facile ilin lernas kaj poste uzas sen malfacileco) aŭ elŝetante kelkajn tre gravajn kaj belajn sonojn nur tial ke la plimulto da presejoj ne mendis ankoraŭ por ili presliterojn supersignitajn kaj estas devigataj presi ilin per «h». Neniu sekve dubos ke antaŭ tiuj ĉi reformoj kiuj por la estontaj uzantoj de E. ne sole havos nenian valoron sed eĉ ŝajnos al ili ridindaj, nun en la dua periodo absolute devas esti forĵetitaj. Ili estas destinataj nur por plaĉi al la nekompententa

publiko aŭ al la neesplorablemaj poliglotaĵoj kritikistoj kaj fari bonan-kaj allogan impreson sur la neesperantistoj, sed kiuj prezentas nenian oportunaĵon aŭ prezentas eĉ rekte maloportunaĵon por tiuj, kiuj fervore uzas E. kaj kiuj bezonas ke E. esprimu iliajn pensojn ne iel, sed perfekte. Tiu ĉi kategorio estas por ni la plej danĝera ĉar por multaj E. ne sufiĉe spertaj aŭ tro sentemaj por la kritiko ĝi per sia ŝajna scienceco estas tro alloga kaj tro facile tiras ilin al vojoj tre danĝeraj. Al tiuj E. mi ripetos kaj neniam ĉesos ripetadi la sekvantan tre gravan regulon : memoru ĉiam ke E. devas sin alkonformigi ne al la gustoj de ĝiaj flankaj rigardantoj sed al la oportuneco de ĝiaj efektivaj uzantoj. Se E. estas bona per si mem, tiam ĝi pli aŭ malpli frue venkos per sia boneco ; sed se ĝi elĵetos el si diversajn gravajn punktojn internajn nur por fari allogan impreson eksteran, ĝi estos simila al sapa veziko kiu kelkajn minutojn plaĉas al la rigardantoj sed baldaŭ krevas kaj malaperas. Ekzemple ĉar kelkaj sonoj prezentas (nur en la komenco) kelkan malgrandan malfacilaĵon por tiu aŭ alia nacio, oni proponas simple elĵeti ilin ; ĉar la uzado de la artikolo prezentas en la komenco malfacilaĵo por slavoj, oni proponas simple elĵeti la artikolon, ĉar la uzado de la akuzativo prezentas en la komenco kelkan malfacilaĵon por angloj kaj francoj oni proponas simple elĵeti ĝin, al la poliglotoj ne plaĉas ke E. havas kelkan nombron da vortoj arte kreitaj, kiujn ili devas lerni — oni simple elĵetu ilin kaj anstataŭigi per vortoj prenitaj el iu ekzistanta lingvo. Tre facilaj solvoj. Sur tiuj ĉi facilaj solvoj estas bazitaj kelkaj novaj projektoj kiuj volis konkuradi kun E. kaj kiuj, tute ne dezirante doni ian praktike elprovan, vivipovan kaj ĉiubezone uzeblan lingvon, volis nur doni projekton kiu farus bonan impreson. Sur tiuj ĉi facilaj solvoj kaj sur tiu ĉi deziro plaĉi al la senspertaj kritikistoj estis ankaŭ bazita — mi sincere tion ĉi konfesas — mia projekto de reformoj en 1894 kiun kelkaj personoj trovas bonega sed kiun mi mem trovas nun terure abomeninda. Ĉar pli vasta praktika elprovado baldaŭ montris al mi, kia sentaŭga senvivaĵo E. fariĝus, se mi farus la frenezan paŝon kaj — por plaĉi al la eksteraj rigardantoj — mi elĵetus el la lingvo tiujn punktojn, kiuj estas por ĝi interne necesaj.

Elĵeto de gravaj sonoj farus la lingvon ne sole ne harmonia sed tre malriĉa kaj ofte tute ne uzebla ; elĵeto de la artikolo (kies malfacileco ne estas granda, ĉar nia lingvo ja permesas ne uzi la artikolon) estus tuta kontraŭnatura, ĉar ni scias ke el la lingvoj kiuj posedis artikolon, neniu jam ĝin perdis, sed el la lingvoj, kiuj ne havis artikolon multaj ĝin perforte devis krei al si (ekzemple : ĉiuj lingvoj romanaj, la lingvo bulgara, ktp.), elĵeto de la akuzativo farus la lingvon tute ne uzebla, ĉar neniu kultura lingvo povas ekzisti sen akuzativo (kelkaj lingvoj ne havas akuzativon en siaj substantivoj kaj ilia fleksebleco multe suferas de tio ĉi kaj tamen eĉ ili ne povis elĵeti la akuzativon en la pronomoj), la ellernado de kelka nombro da vortoj arte faritaj por neniu estas malfacila kaj

kaj fari bonan-  
kiuj prezentas  
oportunajon por  
esprimu iliajn  
as por ni la plej  
sentemaj por la  
a kaj tro facile  
etas kaj neniam  
memoru ĉiam ke  
nkaj rigardantoj  
estas bona per  
boneco; sed se  
ajn nur por fari  
veziko kiu kel-  
krevas kaj mal-  
en la komenco)  
io, oni proponas  
zentas en la ko-  
eljeti la artikolo-  
komenco kelkan  
imple eljeti ĝin,  
nbron da vortoj  
u ilin kaj ansta-  
re facilaj solvoj.  
j projektoj kiuj  
e doni ian prak-  
a lingvon, volis  
r tiuj ĉi facilaj  
kritikistoj estis  
nia projekto de  
ga sed kiun mi  
praktika elpro-  
o E. fariĝus, se  
steraj rigardan-  
as por ĝi interne

le ne harmonia  
la artikolo (kies  
mesas ne uzi la  
ke el la lingvoj  
la lingvoj, kiuj  
l si (ekzemple :  
to de la akuzato  
ra lingvo povas  
zativon en siaj  
o ĉi kaj tamen  
la ellernado de  
s malfacila kaj

tamen ili prezentas grandan oportunecon; homogeneco (unufon-  
teco) de ĉiuj vortoj estas ne sole superflua sed ĝi estus rekte dan-  
ĝera ĉar ĝi tro multe sklavigus ĉiujn popolojn al la popoloj roma-  
naj, kio, pli aŭ malpli frue elvokus tro grandan kaj justan pro-  
teston kontraŭ nian lingvon.

Sekve reformoj de la 3a kategorio, malgraŭ ilia alloga ekste-  
raĵo prezentus nur rektan malbonigon de la lingvo kaj pri ili ni ne  
bezonas paroli.

d) La kvara kategorio prezentas reformojn kiuj per si mem  
eble efektive prezentus kelkan plibonigon sed kies valoro estas tiel  
malgranda ke ili certe ne meritas ke pro ili oni faru ian ŝanĝon en  
la lingvo. Sekve ankaŭ pri tiu ĉi kategorio da reformoj oni povas  
tute ne paroli.

e) Tiamaniere restas nur unu tre malgranda kvina kategorio  
da reformoj kiuj prezentas plibonigon ne sole efektivan kaj sendu-  
ban sed ankaŭ sufiĉe gravan por la praktika uzado de l' lingvo kaj  
kiuj sekve devas esti enkondukataj en la lingvon. Sed la nombro  
de tiuj ĉi efektive reformindaj vortoj kaj formoj estas tre malgranda.  
Kion do ni devas fari kun ili? Ĉu ni devas fari en la lingvo certan  
nombron da ŝanĝoj.

Ne, absolute ne, ĉar E. estas tiel konstruita, ke ne sole ĉiu  
vorto sed ankaŭ ĉiu gramatika formo prezentas nur ereton de la  
vortaro, tial ni bezonas nur krei kelkan nombron da novaj vortoj,  
kiuj ne faros eĉ la plej malgrandan tuŝon en nia Fundamento ĉar  
ili ne anstataŭos la maloportunajn malnovajn vortojn sed ekzistos  
nur paralele kun ili kiel sinonimoj kiuj ekzistas ja en granda nom-  
bro en ĉiu lingvo — kiel neologismoj, kiuj kredeble iom post iom  
elpuŝos la malnovajn formojn kaj faros el ili arkaismojn, tamen  
neniam nuligos, neniam senvalorigos ilin. En ĉiuj estontaj lerno-  
libroj kaj vortaroj de nia lingvo, kaj en ĉiuj novaj eldonoj de la  
ĝis nun jam verkitaj lernolibroj kaj vortaroj la novaj vortoj kaj  
formoj estos presataj ne anstataŭ la malnovaj sed nur krom la  
malnovaj samtempe kun la malnovaj. La novaj vortoj estos aldo-  
nitaj al la Fundamento kaj la estontaj esperantistoj krom la novaj  
formoj lernos ankaŭ la malnovajn, kiuj, eĉ ne estos por ili superflujaj,  
ĉar ili povos de tempo al tempo uzadi ilin kiam ili volos uzi stilon  
antikvan aŭ por akcenti la vortojn.

Sekve la estontaj uzantoj de E. havos nenian novan ŝarĝon  
ĉar kiu ellernis la kelkajn milojn da vortoj de nia lingvo tiu ja  
certe ne plendos se li devos lerni ankoraŭ kelkajn dekojn aŭ cen-  
tojn da vortoj; en la lingvo estos farita nenia ŝanĝo aŭ rompo,  
neniu el la jam eldonitaj verkoj perdos sian valoron, ktp. Kaj kian  
grandegan gajnon ni havos. Dank'al la malmultaj novaj vortoj  
kaj formoj ni ne sole fermos por ĉiam la buŝon al ĉiuj malkonten-  
tuloj, ni ne sole forigos la glavon de Damoklo, kiu sub la formo de  
timataj venontaj ŝanĝoj konstante pendas super niaj verkistoj  
kaj paralizas ilian energion sed kio estas la plej grava, nia lingvo

fariĝos multe pli eleganta, oportuna, kaj flua, ĉar la novaj vortoj estos ĝuste tiuj, kiuj estas uzataj la plej ofte kaj per sia maloportuneco aŭ longeco faras la paroladon E. neoportuna kaj lama.

La enkonduko de certa nombro da neologismoj donos al ni ankoraŭ la sekvantan gravan gajnon : ĝis nun diversaj malkontentuloj diradis ke la praktika uzado montris en E. diversajn gravajn malbonaĵojn, kiujn la esperantistoj timante disfalon, nun jam ne povas forigi, kaj tial la malkontentuloj « estas devigataj krei novajn lingvojn » la ŝanĝo de kelkaj formoj per vojo de neologismoj montros al la mondo ke E. timante nenian disfalon povas tre facile forigi tiujn punktojn kiuj montriĝis efektive malbonaj. Tial se E. eĉ estus absoluteperfekta, ni devis intence fari en ĝi kelkajn ŝanĝojn por fari savantan oferdonon al la dio de malpaco kaj fermi la buŝon al la kriantoj.

Al kiuj ni povos nun ĉiam respondi « Se vi certigas, ke via kritiko estas ne via persona kapricio sed efektive tre grava malbonaĵo pri kiu la tuta mondo konsentas » tiam vi povas jam prezenti vian proponon al la lingva komitato, kiu enkondukos vian proponon per vojo de neologismoj.

La frazo ke « tio aŭ alia ne povas esti enkondukita per neologismoj sed postulas reformon rompan » estus ne vera, ĉar per la sandenĝera vojo de neologismoj ni povas enkonduki ĉion, eĉ en tia okazo, se ĝi postulus ŝanĝon de la formoj jam ekzistantaj ; la diferenco estas nur tio, ke plibonigoj de la lasta kategorio oni devos fari ne per unu fojo, sed per du fojoj. Ekzemplo : 1<sup>o</sup> Imagu al vi ke la Lingva Komitato venis al la konvinko, ke la ĝisnuna « g » nepre devas esti elparolata kiel « ĝ » (kiel opinias kelkaj esperantistoj, kvankam mia opinio estas tute alia) kiel tiam agi ?

Decidi per unu fojo ke « g » povas esti elparolata « ĝ » oni ne povas ĉar tio ĉi donus kolizion kun la formo jam ekzistanta kaj sekve enportus konfuzon en la lingvo. Sed tiam oni povas agi en la sekvanta maniero : oni unue liberigus la literon « g » decidante ke oni povas skribi ankaŭ per la vakanta kaj senkolizia « q » — kaj post kelka serio da jaroj, kiam la « g » jam estos malaperinta el ĉiuj verkoj E. kaj forgesita, oni decidus ke la nun vakanta kaj jam nenian kolizion donanta « g » devas esti elparolata kiel « ĝ ».

2<sup>o</sup> Imagu al vi ke montriĝis necesa ke la multenombro de substantivoj finiĝu per « i » anstataŭ « oj » ; tiam oni agas en la sekvanta maniero : unue oni liberigas la « i » de la infinitivo, decidante ke la infinitivo povas ankaŭ finiĝi per « ar » kiam la « i » de la infinitivo estos jam forgesita, tiam oni enkondukos ĝin por la multenombro.

---

Nun mi prezentas al vi la tabelon de tiuj novaj vortoj kaj formoj kiujn mi proponas enkonduki en nian lingvon kaj aldoni al la fundamento. Tiu ĉi tabelo estas frukto de multejara buŝa kaj letera priparolado kun multaj kompetentaj E. ; tial mi nun ne

la novaj vortoj  
sia maloportu-  
kaj lama.

oj donos al ni  
versaj malkon-  
diversajn gra-  
disfalon, nun  
estas devigataj  
vojo de neolo-  
disfalon povas  
ktive malbonaj.  
ence fari en ĝi  
dio de malpaco

ertigas, ke via  
tre grava mal-  
povas jam pre-  
kondukos vian

kita per neolo-  
era, ĉar per la  
ki ĉion, ĉe en  
ekzistantaj; la  
gorio oni devos  
1<sup>o</sup> Imagu al vi  
a ĝisnuna « g »  
kelkaj esperan-  
am agi ?

ata « ĝ » oni ne  
ekzistanta kaj  
i povas agi en  
« g » decidante  
kolizia « q » —  
os malaperinta  
n vakanta kaj  
ata kiel « ĝ ».

ultenombro de  
oni agas en la  
infinitivo, deci-  
siam la « i » de  
kos ĝin por la

vortoj kaj for-  
kaj aldoni al  
ejara buŝa kaj  
al mi nun ne

volas elmeti la tabelon al nova senfina diskutado sed mi prezentas ĝin al la membroj de la Lingva Komitato, kiel ion pretan kaj tutajan. Mi kompreneble nenion havos kontraŭ tio, se oni komencos en la E. gazetoj vastan diskutadon pri tiu ĉi tabelo kaj mi rezervas el mi la rajton prezenti iam poste al la Lingva Komitato ankoraŭ kelkan nombron da neologismoj, kiuj en la daŭro de la publika diskutado montriĝos kiel gravaj kaj utilaj, dua flanke mi rezervis al mi la rajton ke pri tiu aŭ alia el miaj neologismoj, kiun la diskutado elmontrus kiel malutilan mi poste povu proponi a la Esperantistoj, ke ili evitu ĝian uzadon, kvankam ĝi estas permesita. Sed en la nuna momento mi petas, ke anstataŭ paroli pri diversaj detaloj de mia tabelo, kaj prokrasti la decidon ĝis senfineco, ĉiu membro de la komitato simple respondu pri la tutaj proponoj per « mi akceptas » aŭ « mi ne akceptas », ĉar multaj esperantistoj jam tre senpacience atendas la decidon. Sian respondon ĉiu membro volu sendi al la Prezidanto de la Komitato (plej oportune estas ĉion ĉi fari per la adreso de la Centra Oficejo). Post tri monatoj de la tago de la dissendo de la nuna cirkulera letero la prezidanto bonvolos kompari kalkuli la ricevatajn respondojn kaj tiam ni ekscios, ĉu la Komitato akceptis mian proponon aŭ ne. Kiu en principo aprobas la ideon de neologismoj tiu povas akcepti kuraĝe la tutan tabelon. Timi ke akceptante mian tabelon en ĝia tuteco, la Komitato kune kun bonaj punktoj enkondukos en la lingvon ankaŭ partojn ne bonajn, oni tute ne bezonas, ĉar oni ne devas ja forgesi ke mi proponas ne ŝanĝojn sed nur neologismojn, kiuj ne forigos la formojn jam ekzistantajn, sed estos nur permesataj por uzado paralele kaŭ la formoj antaŭaj; sekve se tiu aŭ alia vorto aŭ formo montriĝos poste ne bona, oni simple ĝin ne uzados. La celo de la neologismoj estas plibonigi la lingvon ne per danĝera ŝanĝado, sed nur per riĉigado, ne per revolucio, sed per evolucio. Sendube troviĝos multaj personoj, kiuj estos nekontentaj de nia tabelo de neologismoj kaj diros, ke oni devas fari ankoraŭ diversajn aliajn plibonigojn.

Tiel mi atentigas, ke tiel same kiel mi nun prezentas serion da neologismoj, tiel same ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj povos de tempo al tempo proponi al la decido de la Lingva Komitato diversajn neologismoj kaj tiamaniere la lingvo, neniam rompante sian plenan kaj plej severan unueco povos per la vojo de simplaj sinonimoj t.e., per la vojo de sola riĉigado ĉiam pli kaj pli perfektigi sed memorante ke tro multe da sinonimoj estus danĝera, la Lingva Komitato kompreneble ĉiam zorgos pri tio, ke la perfektigado fariĝu tre singarde kaj nur en mesuro efektive necesa. Enkonduki novajn tabeletojn da neologismoj mi konsilas ne pli ofte ol unu fojon en kvin jaroj por ke la E. kaj la literaturo havu sufiĉe da tempo por plene digesti en sia spirito la neologismojn antaŭajn.

Antaŭ ol mi donas la tabelon de la neologismoj mi devas per kelkaj vortoj klarigi la ĉefajn principojn, per kiuj mi min gvidis en la elektado de la novaj vortoj aŭ formoj. Tiuj principoj estas du :



UNUA PRINCIPO. — Memorante ke la propaganda periodo de E. estas periodo kelktempa, kaj la periodo de uzado estos periodo, konstanta, sekve la plej grava por ni, mi gvidis min preskaŭ en ĉio ne per la oportuneco de la propagando sed por la oportuneco de la uzado. Kaj mi elektis por novigo nur tiujn formojn kiun en la daŭro de la 19 jara uzado kaj aŭskultado de multaj opinioj montriĝis kiel postulantaj plibinigon efektive. Tiel ekzemple :

a) Mi preskaŭ tute ne tuŝis la alfabeton ĉar pli aŭ malpli frue ĉiuj presistoj, telegrafaj oficejoj, ktp, ja posedos la literojn supersignitajn, kiel ili posedas la literojn supersignitajn de aliaj lingvoj, kaj la demando pri tiuj literoj tute ne ekzistos. Ĝis tiu tempo mi simple konsilas uzadi la literon « h » tiel same kiel la germanoj uzas la literon « c » anstataŭ la signeto en la sonoj *ä, ö, ü*. Kaj rilate la oportunecon en la uzado, la demando pri literoj tegmentitaj prezentas ne apartan nun solvotan demandon, sed parton de demando ĝenerala, kiu koncernas la plibonigon de la tre neoportuna formo de multaj literoj kaj faros objekton de esplorado kaj solvado iam poste, tute sendepende de la demando pri lingvo internacia.

Ĉar iafoje (tre malofte) okazas ke la sonoj « c, g, h, j, s », devas esti elparolataj aparte de la postiranta « h » ni en tiuj maloftaj okazoj povas simple uzi signeton apartigan (ekzemple : « ses'hora », « pac'homo », ktp.).

La uzado de « h » anstataŭ supersigno ne estas io nova, ĝi estas jam de longe permesita en nia lingvo, sed ĉar ĝis nun mi mem neniam uzis la literojn kun « h » kaj ne iu alia E. volis riski fari la komencon kaj ĉar tiamaniere la uzado de literoj supersignitaj estis preskaŭ deviga kaj prezentis grandegan embarason kaj nevenkblan malhelpon sur ĉiu paŝo, ĉe la presado de libroj kaj gazetoj, publikado de E. tekstoj en neesperantaj gazetoj, telegrafado, maŝina skribado, ktp, tial por doni kuraĝigan ekzemplon mi decidis ke ĉiujn miajn artikolojn kaj librojn mi publikigados de nun nur per literoj, kun « h ». Krom tio se la L.K. akceptos mian proponon, mi uzados ankaŭ la literon « y » anstataŭ « j » ĉar tiamaniere farante nenian ŝanĝon en la signifo de la literoj (j konservos ja netuŝite sian antaŭan elparoladon) kaj farante absolute nenian ĝenon aŭ konfuzon por la uzantoj de la lingvo, ni tamen kontentigos tiujn niajn amikojn, kiuj konstante kaj persiste plendas ke la formon « j » en niaj tekstoj la plej gravaj kulturaj popoloj elparolas ĉiam kiel « ĵ », « ĝ » aŭ « ĥ » tio igas ilin vidi en nia lingvo ion barbaran kaj malbonsonan (pri ĥ kaj ŭ rigardu poste).

b) Mi ne tuŝis tiujn formojn aŭ vortojn kiuj estas renkontataj en la lingvo tre malofte kaj tial neembarasas ĝin aŭ kies neoportuneco estas nur kelktempa aŭ tre bagatela. Komparu la analizon de la kvin reformaj kategorioj pri kiuj mi supre parolis.

c) Mi novigis nur tiujn vortojn aŭ formojn kiuj prezentas maloportunaĵon por la konstantaj uzantoj de E. kaj maloportunaĵon

anda periodo de do estos periodo, min preskaŭ en or la oportuneco formojn kiun en ltaj opinioj mon- emple :

ar pli aŭ malpli sedos la literojn gnitajn de aliaj ekzistos. Ĝis tiu tiel same kiel la en la sonoj â, ô, nando pri literoj demandon, sed plibonigon de la objekton de esplora demando pri

g, h, j, s », devas en tiuj maloftaj ple : « ses' hora »,

estas io nova, ĝi ĝis nun mi mem volis riski fari la supersignitaj estis on kaj nevenkebroj kaj gazetoj, legrafado, maŝina on mi decidis ke s de nun nur per an proponon, mi amaniere farante ervos ja netuŝite nenian ĝenon aŭ kontentigos tiujn las ke la formon oj elparolas ĉiam gvo ion barbaran

estas renkontataj a aŭ kies neoparparu la analizon parolis.

uj prezentas mal- j maloportunaĵon

efektive konstantan. Nome mi proponis la nedeklinadon de la adjektivoj antaŭ substantivoj kaj tiamaniere mi forigis la tre oftan kaj malagraban ripetigadon de la finiĝoj « oj, aj, ojn, ajn » (ekzemple : « ĉiu mia bona amata infanoj anstataŭ ĉiuj miaj bonaj amataj infanoj ») ; mi forigis la finiĝon « aŭ » ĉar ofte, akceptante post si vokalon, ĝi fariĝas malagraba ; anstataŭ la nemultaj vortoj kun « h » mi donis sinonimajn vortojn kun « k » kaj tiamaniere mi sen rompado forigis la uzadon de tiu ĉi sono, kiu por tre multaj personoj estos tro malfacile elparolebla, mi unusilabigis la plej ĉefajn pronomojn kaj adverbojn kaj la verbon « esti » ĉar tiuj ĉi plej ofte ripetigantaj kaj tri unuformaj vortoj en sia ĝisnuna formo prezentas superfluan kaj malagraban balaston ; mi donis apartan prepozicion por la pasivo por eviti malklaraĵojn de la tro multesenca vorto « de » ; mi forigis ĉiujn vortojn kiuj donas tro facile konfuzeblajn homonimojn kun vortoj kunmetitaj (ekzemple : « defendi » egalas de « fendi », « postulo » egalas post' ulo) la vorton « esperi » kiu en sia participo donas konfuzon kun la nomo de nia lingvo ; vortojn tro malagrablajn por ia grava nacio « farti » ekzemple por la angloj. Mi unusilabigis la plej gravaj prepoziciojn ĉar ili havas gravegan signifon en la lingvo kaj estas uzataj por kunmetitaj vortoj kiujn ili ne devas fari tro longaj.

DUA PRINCIPO. — Ĉar estas tute ne permeseble ke iu malnova vorto aŭ formo el la Fundamento estu ŝanĝita aŭ ricevu alian signifon ol ĝis nun-alie fariĝus granda konfuzo kaj novaj E. ne komprenus precize la E. malnovan) tial en la novaj vortoj aŭ formoj povas esti uzata nenio, kio donus kolizion kun iu el la jam ekzistantaj formoj. Tial ekzemple mi ne povis uzi ian vokalan finiĝon por la multenombro ĉar ĉiuj vokalaj finiĝoj havas jam alian signifon kiu ne povas esti fordecidita kaj por la evitado de tro oftaj finiĝoj « j » mi devis helpi al mi en alia maniero. Tial ekzemple mi facile akceptis « y » por la sono de « j » sed mi neniel povis akcepti « j » por « ĵ » aŭ « ĝ » kiel insiste postulis kelkaj E. ĉar tiam mi devus fari rompan reformon (Cetere la amikoj de « j » egalvaloranta « ĵ » povas sin konsoli, ĉar se pasos kelka nombro da jaroj kun la konstanta uzado de « y » anstataŭ « j » kaj la E. jam tute dekutimiĝos de la arkaisma litero « j » tiam la skribado de « jh » per si mem fariĝos tuta superflua, per si mem la E. forĵetos la superfluan « h » kaj tiamaniere per vojo tute natura, sen ia konfuza rompo « ĵ » fariĝos « j ».

### IIIa PARTO

#### *Tabelo de la proponitaj neologismoj.*

*Rimarko.* — Kvankam pro oportuneco mi uzos la vorton « anstataŭ » mi tamen atentigas ke la malsupre donitaj novaj reguloj kaj vortoj estas proponataj ne anstataŭ la respondaj malnovaj, sed nur paralele kun ili ; la novaj formoj neniel devas senvalorigi la malnovajn, kies uzado restas permesata kiel antaŭe.

I. — *Parto pli grava.*

La sono « ĥ » estas tute eljetata. Tiu ĉi sono estas rezervata en la alfabeto nur por fonetika skribado de propraj nomoj kaj havas la formon « kh ». En ĉiuj vortoj, kiuj ĝis nun havas la sonon « ĥ » ĝi estas anstataŭigata per la sono « k ». Nur anstataŭ la vortoj ĥolero kaj ĥoro devas esti « kolero » kaj « koruso ».

La sono « ŭ » estas skribata simple « u » sed en la lernolibroj oni klatigas ke « u » post vokalo estas elparolata mallonge (konsonante) farante kun la vokalo, unu silabon; persono por kiu la elparolado de la konsonanta u prezentas ian malfacilaĵon, povas elparoli ĝin kiel simplan « u » sed devas memori ke la « u » post vokalo neniam povas havi sur si akcenton. Se la « u » devas esti elparolata aparte de la antaŭstaranta vokalo, ĝi ricevas antaŭ si apostrofon.

La sono « aŭ » en la fino de vortoj estas forĵetata kaj anstataŭigita per la finiĝo de adverbo (aŭ de alia responda parto de parolo); ekzemple anstataŭ « adiaŭ, morgaŭ, ambaŭ » oni diros « adie, morgo, amboj » (sekve anstataŭ adiaŭa, morgaŭa — adia, morga).

Anstataŭ « j » oni skribas « y ».

Anstataŭ la kvar supersignitaj literoj « ĉ, ĝ, ĵ, ŝ », oni skribas tiujn samajn literojn kun « h » tute forĵetante la uzadon de supersigno.

Sed la « h » devas esti elparolata aparte de la antaŭstaranta c, g, j, s, ĝi ricevas antaŭ si apostrofon.

Adjektivoj kaj adjektivaj pronomoj havas deklinacion (t.e. multenombro kaj akuzativon) nur tiam kiam ili staras sen substantivo.

Anstataŭ « esti » kaj ĉiuj ĝiaj formoj (estas, estis, estos, estus, estu, estanta, ktp.), estas uzata « i » kun ĉiuj ĝiaj formoj (as, is, os, ktp.).

Anstataŭ « kaj » estas uzata « e ».

Anstataŭ « kiel » kaj « tiel » estas uzataj « kom » kaj « sik ».

Anstataŭ « kie » kaj « tie » — « ki » kaj « ti ».

Anstataŭ « kio, tio, kiu, tiu » — « ko, to, ku, tu ». Tiuj ĉi vortoj ne havas deklinacion (t.e. ili restas senŝanĝaj en la multenombro kaj akuzativo).

La « ĉi » de la pli proksima montrado estas anstataŭigita per la litero « s » antaŭ la vorto; sekve sti, sto, stu, anstataŭ « tie ĉi, tio ĉi, tiu ĉi ».

Anstataŭ 'ajn' oni uzas an.

Sufikso de landoj estas « i » anstataŭ « uj » (ekzemple : Anglio anstataŭ Anglujo). La nomoj de kreskaĵoj estas farataj per la vortoj « arbo » aŭ « planto » anstataŭ la sufikso « uj » (ekzemple : pomarbo, rozplanto).

Estas enkondukata nova sufikso « aĉ » por montri malestimon (ekzemple : ĉevalaĉo = malbona ĉevalo).

Anstataŭ la sufikso « ist » oni uzas st se la radiko de la vorto finiĝas per « i » (ekzemple : farmacisto anst. farmaciisto).

La prepozicioj « antaŭ » kaj « post » ricevas ambaŭ duoblajn vortojn aparte por la ideo de loko, kaj aparte por la ideo de tempo. Nome « vor » = antaŭ kaj, « post » = post pri tempo, « davan » kaj « hint » pri loko.

Estas enkondukata nova prefikso « kum » por esprimi la malon de « dis » (= germana *zusammen*). Ekzemple : konkuri = kuri kun iu, kumkuri = kuri de diversaj lokoj al unu loko.

Anstataŭ « de » post pasivo oni uzas « ab » (ekzemple : li estas amata ab mi).

## II. — Simplaj vortoj.

Anstataŭ la vortoj de la 1a kolono oni povas uzi la vortojn de la 2a.

1	2	1	2
alumeto	alumo	nebulo	neblo
anstataŭ	stete	oficiro	ofisiro
arĥitekturisto	arkitekto	orakolo	oraklo
ĉikani	ĵazi	ordoni	jubi
defendi	defensi	perfidu	fidrompi
deklinaĉii	deklini	postuli	poski
esperu	speru	purpuro	purpo
fartu	statu	rabato <small>(скупка)</small>	rabaso
fontano	fonteno	rabotu	rabodi
haringo	harengo	regulo	reglo
kalko <small>(извести)</small>	kalĉo	sukero	sukro
konjugaciĉii	konjugu	trikoto	trikaĵo
markoto	markodo	tubero <small>(бугорок)</small>	tubro
marmoro	marbo	volonte	volunte

## III. — Vortoj senafiksigitaj

mallonga	breva	interparoli	sermi
malpli	men	malbona	mava
malsupren	sob	maldiligenta	pigra
kreskaĵo	planto		

Ekz. de teksto.

Patro nia, ku as en la chielo, sankta u Via nomo, venu regno Via kom en la chielo, sik anke sur la tero. Nia chiutaga pano<sup>n</sup> donu al ni hodie e pardonu al ni nia shuldoyn, kom ni anke pardonas al nia shuldantoyj. Ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de mavo.

Posta aldono.

Multaj sendube miros, kial mi proponas al voĉdonado per unu fojo & tutan tabelon da neologismoj, anstataŭ voĉdonigi pri ĉiu

punkto de la tabelo aparte, kio, ja multe pli facile kondukus al akcepto almenaŭ de apartaj punktoj, dum ĉe la unua maniero mi riskas, ke oni forĵetos mian tutan projekton. Mi tion ĉi klarigos.

Dum la enkonduko de novaj vortoj estas afero tute bagatela kaj ne bezona ĉe la permeson de la Lingva Komitato, la enkonduko de tio, kion mi nomas « neologismoj » (t.e. de novaj formoj, kiuj devos konkuradi kun formoj ekzistantaj jam en la Fundamento) estas paŝo tiel gravega kaj tiel skuanta ke ni povas ĉion ĉi permesi al ni nur tre malofte (ne pli ol unu fojon en 5-10 jaroj). Sekve kiam ni decidis tion ĉi fari, ni devas jam enkonduki pli grandan nombron da neologismoj per unu fojo, ĉar se ni volus enkonduki nur 5-10 neologismojn (kio eble rezultus ĉe voĉdonado popunkta) tiam la utileco de la enkondukitaj neologismoj estus tro malgranda por kovri la malutilon, kiun donus la fakto mem de la enkondukado. Provi krei tabelon por diskutado publika estus afero tro danĝera. Tio ĉi estas la kaŭzo kial mi proponas ke oni akceptu mian tutan tabelon, aŭ nenion.

Kelkajn detalojn mi povus ŝanĝi poste, se la komitato principe akceptus mian projekton kaj per tio ĉi donus al mi la eblon submeti ĝin al diskutado publika; per la nuna projekto mi volas nur demandi la komitaton ĉu principe ĝi trovas ke la enkonduko de tabelo de neologismoj estas nun akceptebla kaj ĝustatempa.

Se mia projekto ne estos akceptata en ĝia tuteco, mi faros neniamajn provojn, por akceptigi apartajn partojn de ĝi. Sed ĉar parto de la esperantistaro pensas, ke tiu aŭ alia punkto de la lingvo nepre devas esti ŝanĝita; kaj nur mia persona obstineco ĝin malhelpas, tial mi sciigas la jenon: ne sole ĉiu E. havas plenan rajton proponi al la voĉdonado de la L.K. ĉion kion li volas sed mi ĉe antaŭe promesas ke ĉion, kion la L.K. akceptos mi ankaŭ senproteste akceptos.

L.L. ZAMENHOF.

Kiu estis la sorto de tiu grava projekto. Jam la 30/11/06 Javal skribis al Z.:

Mi ĉiel penis por atingi la enpreson de via projekto en la Revuo de Bourlet. Ĉe lia obstina kaj energia rifuzo, mi petis lin skribi rekte al vi por klarigi al vi sian pozicion. Se la opinio de Boirac estos la sama, kiel tiu de Bourlet, via memuaro neniam venos en la lumon ...

Certe Bourlet timis pri la bona vendado de ĉiuj libroj eldonitaj de Hachette.

Tiam Z. skribis la sekvantan leteron al Javal (2/12/06).

Se la Centra Oficejo dissendos mian projekton al la membroj de la L.K. mi petas ke tuj en la komenco de la projekto estu aldona la sekvanta averto:

KONFIDENCA

Destinita nur por la membroj de la L.K.

Ĉar en la okazo, se la L.K. trovos la projekton pri neologismoj neakceptebla aŭ tro frutempa la publika parolado pri tiu projekto povus esti tre malutila kaj vekti denove la hidron de malpaco inter la E. tial la aŭtoro de la projekto atentigas ĉiujn membrojn de la L.K., ke ĝis la tempo kiam la K. trovos utila akcepti la projekton, la enhavo de la projekto devas resti severe konfidenca. ■

Ricevinte la projekton Boirac skribis al Z. 9/12/06.

Transsendante al mi vian leteron pri neologismoj kun peto dissendi ĝin al ĉiuj membroj de la L.K. vi bonvolis tamen aldoni al tiu peto la jenan kondiĉon : « se vi nenion havas kontraŭ ĝi ». Mi do kuraĝas tre respekte kaj sincere prezenti al vi la motivojn pro kiuj mi ne plenumis senprokraste la faritan al mi komision, sed post longa kaj serioza ekzameno de via letero mi akiris la opinion, ke estus tre eble tre danĝera paŝo por nia afero, se ĝi estus oficiale komunikita en sia nuna formo mi ne diras al la publiko, sed eĉ al la L.K.

Neniu povas nek intencas rifuzi al vi la rajton fari en E. ĉiujn reformojn, kiujn vi juĝos necesaj aŭ utilaj, sed la demando estas, ĉu la nunaj cirkonstancoj postulas efektive reformojn aŭ eĉ estas favoraj por ilin provi.

Tuta prave vi distingas en la ekzistado de E. du periodojn, la unuan de propagando, la duan de uzado ; kaj ŝajnas ke laŭ tiu distingo vi konsideras la farotajn reformojn kiel taŭgajn nur por la dua periodo, se mi bone komprenas ĉi tiun lokon de via letero : « Memorante, ke la propaganda periode de E. estas nur periodo kelktempa kaj la periodo de uzado estas periodo konstanta sekve la plej grava por ni, mi gvidis min en ĉio (t.e. pri la proponataj reformoj) ne per la oportuneco de la propagando sed por la oportuneco de la uzado ». Ĉu mi devas konkludi de tio, ke la propaganda periodo estas, laŭ via opinio, finita aŭ almenaŭ finiĝanta kaj ke ni eniras de nun tute trankvile kaj senriske en la uzadan. Ho se tio povus esti vera. Sed bedaŭrinde oni devus blindigi sin vole por ne vidi, ke la propagando de E. kiom ajn grandaj estas ĝiaj lastaj progresoj, estas apenaŭ komencata rilate al la vasteco de la kampo, kiun ĝi devas trapenetri. La malnovaj antaŭjuĝoj kontraŭ artefarita lingvo internacia iom post iom malfortiĝas ; en preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj la nomo de E. estas konata kaj ne vokas plu mokemon ĉiutage ; la nombro de la E. pligrandiĝas, sed ĉu estas sufiĉe por certigi ke nia afero venkis kaj ke restas al ni ĝui la fruktojn de nia venko ?

Tute kontraŭe, ni ne forgesu ke la kontraŭuloj de E. estas ankoraŭ multaj kaj influaj, precipe en la altaj fakoj de la societo, literaturistoj, sciencistoj, universitatanoj kaj registaranoj, ke en preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj la plimulto da homoj ne ankoraŭ

sentas ian intereson pri la demando de helpa internacia lingvo kaj rigardas ĝin kun plena indiferenteco ; fine ke se oni komparas la nombron de la E. en la mondo kun la nombro de la ne E. tio estus kvazaŭ kompari rivereton kun oceano. Precipe ni memoru, ke tiel longe dum Esperanto ne estos enkondukita en la publikajn lernejojn de la ĉefaj civilizitaj popoloj.

Ĝia estonteco estos malcerta kaj kaduka ; kaj ke ni devas antaŭ ĉio klopodi por trafi tiun celon. Mi do konkludas, ke la periodo de propagando ankoraŭ nun daŭras kaj sekve trudas al ni siajn neeviteblajn necesojn. Sed en tiu ĉi la plej grava sendube estas la perfekta interkonsento de ĉiuj E. pri la fiksco de ilia lingvo (1).

Efektive se ili malkonsentas inter si pri tiel esenca punkto kiel do ili povos rebati la kontraŭulojn dirantajn : « Antaŭ ol proponi al nia akcepto vian lingvon, komencu do mem interkonsenti pri ĝi » ? Tiam necesecon vi nepre vidis kaj montris, estimata Mastro, al ĉiuj E. kiam en la buljona Kongreso vi petis unuaniman aliĝon al la Deklaracio pri la fundamenta netuŝebleco de E. Nur unu jaro pasis de tiu tempo ; ĉu tiu neceseco ankaŭ pasis ? ŝajnas al mi pli ĝuste ke ĝi fariĝis pli forta kaj pli urĝa. Vi eble scias, ke la propono farita dum la lasta jaro de unu el la francaj deputitoj por ke E. estu oficiale akceptita en la programojn kaj ekzamenojn de la francaj publikaj lernejoj, estos baldaŭ diskutata en la franca deputitaro, sed kiel ni povas esperi la sukceson de tiu gravega entrepreno, se la kontraŭuloj de E. havus okazon diri ke la lingvo, kies akcepton oficialan oni proponas por publika instruado, jam malplaĉas al siaj adeptoj mem kaj ke en tiu ĉi sama momento okazas baloto inter ili por decidi, ĉu oni ne devas pli-malpli reformi ĝin.

Vere estas, ke oni povus rediri al mi, ke, se ni deziras trafi la oficialan akcepton de E. ĉu de la registaroj por ĝia enkonduko en la publikajn lernejojn, ĉu de la akademioj kaj universitatoj kiel internacia lingvo de 1<sup>a</sup> kongresoj kaj sciencaj komunikoj, ni devas unue forigi la neperfektaĵojn kaj maloportunaĵojn, almenaŭ la plej gravajn kaj universale spertitajn ; ĉar oni diras : « Antaŭ ol akcepti E., vi povas esti certaj ke la supre nomitaj aŭtoritatoj nepre postulos tian forigon ».

Ni supozu, ke tiel okazos efektive : ĉu ne estus pli prudenta atendi, ĝis oni petos de ni reformojn kaj oni montros al ni kiomajn kaj kielajn oni petas, anstataŭ iri renkonten al postuloj, kiujn ni ne ankoraŭ konas kaj neniu povas antaŭkoni ? La historio de E. jam sciigis nin, ke tre malmultaj estas la punktoj, pri kiuj povas

(1) Boirac ŝajne konfuzas la periodo de uzado (kun kelkaj dekmiloj da E. kun la periodo de triumfo kiam E. estos devige instruita en la unuagradaj lernejoj de la civilizitaj landoj. Tute prave Z. pensis ke en la periodo de uzado de 1906 oni povus enkonduki la necesajn reformojn ĉar dum la periodo de triumfo tio estos absolute necbla kaj E. konservos eterne ĉiujn siajn malbonaĵojn.



P-ro Jakobo MEAZZINI  
AREZZO  
Fervora propagandisto

interkonsenti reformantoj de nia lingvo (mi parolas pri senpartiaj kaj kompetentaj reformantoj). Povus do okazi, se ni farus de nun reformojn, laŭ iu ajn projekto, ke poste ni ricevus de la Registaroj aŭ Akademioj priponojn tute kontraŭajn al la reformoj jam de ni decititaj. Mi do opinias, ke estas pli bone atendi tiajn proponojn, se ili efektive estas farotaj (2).

Sed tion ĉi mem oni povas pridubi. Se E. venkos, ne per la helpo de la Registaroj kaj Akademioj ĝi venkos; sed la Registaroj kaj Akademioj konsentos kunhelpi al ĝia venko, nur se ili estos devigataj al tio per la forto de la publika opinio. Kion do postulas la publika opinio por akcepti nian lingvon? Ĉu ke ĝi estu ĉiuflanke, teorie aŭ eĉ praktike perfekta? Tute ne, Teoriajn kaj eĉ praktikajn neperfektaĵojn ĝi facile pardonos, se la lingvo estas sufiĉe simpla kaj facila; sed ĝi postulos antaŭ ĉio, ke ĝi estu fiksa kaj firma sur siaj fundamentoj. Ni do, ne ellasu, kiel diras proverbo, la kaptajon por la ombro.

Se vi aprobas, Estimata Majstro, la rimarkojn, kiujn mi ĵus havis la honoron prezenti al vi, mi petas vin ke vi prokrastu ĉiun proponon de reformoj, ĝis tiaspeca propono estos farite ĉu de iu registaro ĉu de ia ajn oficiala aŭtoritato kiel ekz. de la Internacia Akademiario aŭ de la Delegacio.

Tamen se vi persistos deziri ke via projekto estu dissendata al ĉiuj membroj de la L.K. mi ne povas ne montri al vi, kiel estus danĝere konservi ĝin en ĝia nuna formo t.e. kun la kondiĉo ke ĉiu membro de la L.K. simple respondu pri la tutaĵo per « mi akceptas » aŭ « mi ne akceptas ».

Kvankam mi ne volas antaŭjuĝi pri la decido de miaj kolegoj mi estos tre surprizita, se al demando tiel esprimita la preskaŭ tuta L.K. ne sentos sin kvazaŭ devigata respondi: « Ne akceptas ». Certe tiu respondo profunde malĝojigos nian koron, ĉar estos por ni ĉiuj terura doloro kontraŭstari al propono de nia Majstro sed, eĉ aprobante kelkajn aŭ multajn el la detalaj reformoj proponitaj en via letero, estas tute neeble, ke ni aprobu ĉiujn sendistinge, sendiskute, kvazaŭ, pardonu tiun vorton, per blinda voĉdonado. Kio estos la rezultato de tiu ŝajna malkonsento inter la kreinto de E. kaj la konsilantoj de li mem elektitaj por la konservado kaj la perfektigado de lia kreaĵo? Oni vane esperos ke la publiko ne informiĝos pri tiu malkonsento. Vi permesas ke la 90 membroj de la L.K. uzu daŭron de tri monatoj por pripensi kaj sendi sian respondon. Kvankam vi petas ke ili tenu la aferon konfidence sekreta, ĉu estas eble, ke la sekreto ne disflugos tra la tuta esperantistaro? Aliparte se ĉiuj E. akceptos plimalpli volonte, sed tamen senribele la nean respondon de la L.K. ĉu niaj eksteraj kontraŭuloj ne ripetados ke Esperantismo estas kvazaŭ fanatika religio, kiu sin stari-

(2) Kompreneble Boirac sciis bone ke ili neniam estos farataj. Sed li volis sufoki la plej necesajn plibonigojn.



Rafaelo BAGNULO L. K.  
NAPLO  
Aktoro de « Gefratara Esp-a »



gas kiel senerara kaj perfekta kaj rifuzas obstine ĉiun ekzamenon, ĉiun korekton, ĉiun perfektigon ? Ĉiuflanke aperos antaŭ mi malbonaĵojn por nia afero.

Se do, malgraŭ la danĝeroj montritaj en la unua parto de mia letero vi opinias necese ke mi sendu vian leteron al la L.K. mi insiste petegas vin ke vi forigu la kondiĉon voĉdoni pri la tutaj, sed permesu ke oni voĉdonu pri ĉiu punkto aparte, tute egale ĉu per simpla « mi akceptas » aŭ « mi ne akceptas » ĉu aldonante rezonojn. Kaj ankaŭ ke vi mallongigu la daŭron de la konsiliĝo, ĝis unu monato kaj duono, kio estos plene sufiĉa.

Nun mi devas aldoni kelkajn vortojn pri la fundo mem de via projekto. Mi plene konsentas (kaj kredeble miaj kolegoj ankaŭ konsentos) pri la reforma metodo per neologismoj. Tio estas ke, se oni devas fari reformojn, ili estas fareblaj nur per la neologisma metodo, ne nuligante, ne ŝanĝante la malnovajn sed nur aldonante novajn formojn. Sed principe akceptinda, tiu metodo estas praktike malfacila kaj oni devas uzi ĝin kun granda singardemo, se oni ne volas diversiĝi senfine la lingvon. Supozu efektive, ke al ĉiu vorto aŭ eĉ al ĉiu gramatika regulo jam ekzistantaj oni apudmetu duan vorton, duan regulon novajn, ĉu tiamaniere oni ne havus du E. paralelajn kiuj povus esti tute diferencaj (1) ? La kreado de neologismoj precipe pri la gramatiko, ne devas do esti tro ofta, tro libera, eĉ mi volonte dirus ke pri la gramatiko ĝi devas esti nepre malpermesata. Tial mi ne konsentas akcepti, ke en la estontaj lernolibroj de E. oni legos, laŭ via propono la jenajn duvizaĝajn regulojn : « La adjektivo akordiĝas aŭ ne akordiĝas laŭvole kun la substantivo, ĝi akordiĝas nur kiam ĝi anstataŭas substantivon ne esprimitan ». Kaj la adjektivo lokiĝas laŭvole antaŭ aŭ post la substantivo. Tamen kiam ĝi ne akordiĝas kun la substantivo, ĝi devige lokiĝas antaŭ ĝi. Ankaŭ : « ĉiuj pronomoj ricevas multenombrojn kaj akuzativon, tamen la rilataj pronomoj : tiu, kiu, tu, ku, povas laŭvole ilin ricevi aŭ ne. Ĉu vi opinias ke tia redaktado de la estontaj lernolibroj faciligos la lernadon kaj propagandon de E. ? Rimarku plie se la rilataj pronomoj. Tiu, kiu, tu, ku, povas esti uzataj sen multenombro kaj akuzativo oni jam ne povas distingi « tiuj, kiuj » kaj « tiu, kiu ». Aliparte se oni povas multe aktiviĝi laŭvole « tu, ku » ili fariĝos « tuj » (jam ekzistanta kun tute alia senco) « kuj » (kiu sonas france tute malĉaste, multe pli ol « farti » angle (2), tun, kun (jam ekzistantaj kun alia senco).

Vi do estos, devigata diri « La pronomoj rilataj estas tiu, kiu (kiuj multenombriĝas kaj akuzativiĝas aŭ ne laŭvole); paralele « tu, ku » (kiuj devige ne multemonbriĝas ne akuzativiĝas). Kia mirinda simpleco.

(1) Absurda rezonado : oni havus E. kaj alian lingvon. Z. proponis nur *kelkajn* neologismojn.

(2) En la angla lingvo « farti » sonas same kiel « peti » en la franca lingvo.

Multajn aliajn kritikojn mi povus fari, kvankam pri kelkaj punktoj mi plene konsentas kun vi, sed eble tio, ĉi sufiĉos por vin konvinki ke estas tute neeble akcepti «tutaje» reformojn, kiuj nekondukis tiel gravajn komplikadojn en nian lingvon. Tial, kiel lasta peto, mi petas vin ke vi atente kaj sorge traesploru ĉiujn punktojn de via projekto por antaŭrigardi kiajn sekvojn ĝi havus rilate al la tuta vortaro kaj gramatika sistemo de E. mi kuraĝas pensi ke post tia esplorado, vi forlasus mem pli ol duonon de viaj proponoj.

E. BOIRAC.

Al tiu letero Z. respondis la 2/1/07 ke li reprenas sian projekton pro la opono de Bourlet kaj Boirac.

Sed Z. estis duoble prava pri la neceso de reformoj kaj pri la ĝusta momento. Efektive post 20 jaroj de praktikado, Z. bone sciis kiujn skoriojn oni devus forĵeti de la lingvo por ke ĝi fariĝu preskaŭ perfekta.

Pri la momento, 1906-1907 estis la epoko kiam la reformoj estis postulataj de multaj esperantistoj kaj la nombro de la uzantoj ĉirkaŭ 20/30 000 ne estis tro granda por ke la reformoj estus akceptataj de la granda plimulto. Pli poste la reformoj fariĝos neblaj pro la granda nombro de la esperantistoj kaj Esperanto konservos eterne siajn skoriojn.

Plie ĉar la reformo ne estis farite de interne, pro la kulpo de Bourlet kaj Boirac, ĝi devis fariĝi de ekstere, kaj baldaŭ Couturat kaj Beaufront komencos la agadon per la grava krizo de Ido.

ĉiun ekzamenon,  
s antaŭ mi mal-

ua parto de mia  
n al la L.K. mi  
oni pri la tutaj,  
te, tute egale ĉu  
a aldonante rezo-  
la konsiliĝo, ĝis

ando mem de via  
j kolegoj ankaŭ  
Tio estas ke, se  
er la neologisma  
ed nur aldonante  
todo estas prak-  
ngardemo, se oni  
ektive, ke al ĉiu  
aj oni apudmetu  
oni ne havus du  
kreado de neolo-  
i tro ofta, tro li-  
devas esti nepre  
n la estontaj ler-  
duvizaĝajn regu-  
laŭvole kun la  
substantivon ne  
antaŭ aŭ post la  
a substantivo, ĝi  
j ricevas multe-  
noj : tiu, kiu, tu,  
ke tia redaktado  
kaj propagandon  
tiu, tu, ku, povas  
am ne povas dis-  
povas multe akti-  
anta kun tute alia  
te pli ol « farti »  
»).

ĉiuj estas tiu, kiu  
laŭvole); paralele  
kuzativiga). Kia

on. Z. proponis nur

en la franca lingvo.